

Margarete Saxl (1889-1938)

Margarete Saxl estis ĉeĥa esperantistino kaj Cseh-instruistino.

Ŝi forpasis pro korparaliziĝo dum Universala Kongreso de 1938 en Londono.

Ŝi instruis fremdajn lingvojn ĉe komercista privatlernejo proksime de la stacidomo Börse (borso) en Berlino.

Laŭŝajne ŝi scipovis sep lingvojn kaj Esperanton, kiun ŝi lernis nur dum tri semajnoj.

Ŝi membriĝis en la Cseh-grupoj kaj multe agis eksterlande, precipe en Nederlando, Danlando, Svedujo kaj Norvegujo kune kun Margarete Glaser kaj Julius Glück, ambaŭ berlinanoj.

Komence de la 30aj jaroj, ŝi organizis vesperkursojn, kiuj kutime okazis ĉiulunde en la Café Braun (Kefejo Braun) en la Charlottenstraße apud Lepzigerstraße (ĉi-maldekstre).



Charlottenstraße en Berlino

Anonco pri ŝia forpaso

FONTOJ:

- *Esperanto en Perspektivo*, UEA, 1974;
- *Stelsemantoj en la ora nordo*, Katalin Kováts, E-dukati, Den Haag, 2011;
- *Jubilea Libro 1903-2003, Esperanto Lingvo kaj Kulturo en Berlino*, Fritz Wollenberg (Red.), Esperanto-Ligo-Berlino.



En la 20aj kaj 30aj jaroj, la Internacia Lingvo Esperanto kaj la Cseh-metodo furoris en norda Eŭropo kaj aro da lernolibroj por progresintoj kaj superaj kursoj ebligis profundigon de la scio akirita sur pli malalta nivelo. Al tiu ĉi speco apartenas ŝia lernolibro **Daŭriga kurso post Cseh-kurso**, eldonita unu jaron antaŭ ŝia forpaso, en 1937, de la Dana-Esperanto-Librejo

The Argus (Melbourne, Vic. : 1848 - 1957), Friday 5 August 1938, page 1

WOMAN ESPERANTIST DIES AT CONGRESS

LONDON, Thursday
Margarete Saxl, aged 48 years, a Czech and a leading teacher of Esperanto, collapsed and died in London to-day while attending the Esperanto Congress.
Just before she died she spoke in Esperanto, and said: "I am glad I have been able to do so much for the movement."
She was to have been honoured at the congress ball to-night.

National Library of Australia <http://nla.gov.au/nla.news-article12458596>

://trove.nla.gov.au/ndp/del/printArticleJpg/12458596/3?prin... 1/